Estis antaŭvidite, ke la operacio konsistos el du momentoj: dum la unua la kuracistoj malfermos la korpo-parton, forprenos kelkajn malsanajn ĉelojn kaj refermos la vundon; se la analizo montros benignan tumoron, ne necesos ion alian entrepreni. En kazo de maligna formo, kelkajn tagojn poste estos okazinta la dua parto, nome la ablacio, science difinita mastektomio. Tia estis la kirurgia proceduro, tiam.

Danke al la cirkonstanco, ke ni MTO- funkciuloj ĝuis privatan san-asekuron, mi povis mendi urĝan enhospitaligon ĉe privata kliniko en Madrido. La kirurgia interveno okazis la sekvantan tagon je la 23-a horo. Antaŭ ŝia forporto al la operacia salono ni interŝanĝis kelkajn am-vortojn. Kuŝante en rul-lito, ŝi aspektis serena, kvazaŭ la operacio koncernus alian personon. Je noktomezo, en la ĉambro, kie mi atendis, sonoris la telefono. „Ĉi tie la operacia salono”. La sango frostiĝis en mi. ”Ne timu! Ĉio ĝis nun en ordo!; la esploro montras, ke temas pri maligna kancero. Ĉu vi konsentas, ke jam nun okazu la dua operacio?” Decidi ankaŭ en ŝia nomo estas facile: Ada senhezite konsentus.

Kelkajn horojn poste, ŝi denove troviĝis en la hospitala dormo-ĉambro. Komence de la posttagmezo, malferminta la okulojn, ŝia mano aŭtomate glitis al la bandaĝita parto. ”Ne tuŝu”, mi petis. Ŝi tuj divenis: „Ĉu jam okazis ankaŭ la granda operacio?” Jes, ĝi okazis kaj ŝi estis kripligita de organo grava por virino. La informo ne nur ne skuis ŝin, sed baldaŭ je miaj miro kaj timo ŝi memstare leviĝis kaj tenante la serum-ampolon en la mano, sen helpo iris al la banejo.

Du tagojn poste Ada revenis hejmen, sed jam ne kuŝadis en lito. Rapide ŝi revenis al sia energi-plena agado, kiel se nenio estis okazinta. Al la UK kaj al Pollando ŝi veturis kiel antaŭvidite.

Ekzistas ĉe mam-kancero la eblo, ke post 3-5 jaroj ĝi ripetiĝu ĉe la alia flanko. Dum la sekvantaj 11 jaroj Ada, regule submetiĝis al kontrolo mamografio kun favora rezulto: la danĝero iom post iom malaperis; ĉe ŝi kreskis la sento, ke ŝi venkis la malsanon.

Ŝia vivo antaŭ la fina malsano

Fine de 1988, mi sukcesis iom anticipe emeritiĝi kaj ni kune translokiĝis al mia naskiĝ-urbo, Torino, kie Ada renkontis amikan esperantistan kaj familian etoson. Ŝi rapide integriĝis en la nova vivo, dum tri sinsekvaj jaroj vizitis someran kurson de itala lingvo por eksterlandanoj ĉe la universitato en Perugia. Kun denaska entuziasmo ŝi daŭrigis la kutiman eldonan kaj socian agadon. Same kiel dum la antaŭaj 27 jaroj respektive en Bruselo kaj en Madrido, Ada nun aktivis ĉe la loka Esperanto-societo, kun ŝi ĉiusemajne animis per programoj, prelegoj kaj iniciativoj, ĉar ŝi ŝategis esti

inter homoj: unu el ŝiaj mem-elektitaj taskoj estis la societaj festoj-Kristnaskaj, Karnavalaj kaj monataj komunaj vespermanĝoj-, kiujn ŝi kunordigis, mem kuirante por dekoj da personoj varmajn pladojn kaj polajn specialaĵojn. Aldone al la komunaj festoj, ŝi organizis hejme privatajn renkontiĝojn ĉefe por junaj esperantistoj; kaj en Madrido kaj en Torino kelkfoje kunvenis ĉe ni ĝis trideko da geamikoj. Baldaŭ en la urba kvartalo ĉiuj-najbaroj kaj butikistoj- ŝatis kun ŝi interparoli.

a) La gazeto

Tamen, ŝia ĉefa intereso koncentriĝis alie, nome ĉe la aperigo de la gazeto „Heroldo”. Ĉi lasta multe estis evoluinta post 1961, kiam ŝi aĉetis ĝin de la fondinto, la emerita Teo Jung. La tasko tre plaĉis al ŝi, ĉar ĝi respondis al ŝiaj studoj (slavistiko kaj specialiĝo pri ĵurnalismo) kaj pli frua profesio en Varsovio (redaktorino ĉe eldonejo kaj ĉe la pola radio).

Por kompreni la laboron de „Heroldo”, necesas superrigardo pri ĝi. En la Brusela periodo, ĝis 1978, la gazeton kompostis kaj presis firmao en Nederlando: inter Bruselo kaj Roterdamo ekspresa poŝto veturis unu tagon: Ada sendis la materialon kaj la enpaĝigan modelon komence de la semajno al la presisto; li resendis al ŝi la pres-provojn eksprese vendrede vespere, por ke sabate – dimanĉe ŝi pro-legu ilin kaj resendu la korektojn al Nederlando la sekvantan lundon matene, por finpresado kaj elsendo okazantaj en kelkaj tagoj. La tutjaraj-aperdatoj, atentantaj la feriajn periodojn, estis fiksitaj en la antaŭa decembro kaj tuj sciigitaj al la presisto. Apartajn zorgojn kaŭzis la adresaro de abonantoj, ĉar tiam ne ekzistis komputilaj sistemoj; Ada disponis pri malmultekosta neaŭtomata spiritusa adres-maŝineteto kaj permane stampis sur rulpapero, po unu, la slipojn sendotajn al la presisto por la ekspedo de „Heroldo”. La gazeto estis tiom malriĉa, ke la unua skribmaŝino povas esti aĉetita nur danke al donaco de usona abonanto. En la komenco, Ada ricevis simolan rekompencon (temis pri duono de salajro de balaistino en mia oficejo), sed baldaŭ ankaŭ tio montriĝis neebla kaj ĝis la fino ŝi laboris senpage, sed same entuziasme.

Post 1978, en Hispanio, la metodo iomete ŝanĝiĝis. Ekonomie konvena presejo situis ĉe la malliberejo de Alcala de Henares, apud Madrido. La interŝanĝo de materialo kaj korektoj okazis per privata poŝto, pere de ĉiutaga aŭtobusa servo inter la du urboj.

Je la instaliĝo en Torino, dek jarojn poste, Ada-kvankam jam 60-jara- rapide lernis komputilajn kompostadon kaj enpaĝigon, kio permesis transiri al moderna labor-tekniko kaj mem tajpi, korekti kaj enpaĝigi hejme la gazeton. Presado kaj elsendo komence okazis ĉe esperantista entrepreno en Pisa, poste en Torino. La aspekto de „Heroldo” plibeliĝis danke al enkonduko de plia kolumno kaj utiligo de pli taŭgaj liter-tipoj. Flanke de miaj novaj liber-profesiaj okupoj - mi iomete helpis koncerne al revizio, de ricevataj artikoloj, al administrado, provlegado, krom rilate al eldonado de lernolibroj de Esperanto en la ĉefaj naciaj lingvoj. Antaŭ la falo de la Berlina muro, kiam la Orient-Eŭropaj esperantistoj ne rajtis sendi monon eksterlanden, Ada aranĝis en la koncernaj landoj bankajn kontojn, ĉe kiuj la esperantistoj pagis la abonon en lokaj devizoj, laŭ la tiea oficiala kurzo: la sistemo apenaŭ kovris la sendokostojn, sed dum tiuj mallumaj jaroj ebligis al kelk-miloj da homoj ricevi internacian E-gazeton.

Famiĝis la specialaj fakaj numeroj (internacia juro, malsato en la mondo, astronomio, k.a.) kaj la duonjaraj duoblaj numeroj: unu dediĉita al la esperantistaj kongresoj kaj renkontiĝoj (ŝi pacience dum tuta jaro kolektis informojn kaj logotipojn pri pli ol 200 internaciaj kunvenoj); la alia speciala numero detale raportis pri la Universalaj Kongresoj de Esperanto (sep paĝoj el ok detale priskribis ĉiujn eventojn, dividitajn laŭ programoj, fakoj, universitataj prelegoj, infana kongreseto, intervjuoj al organizantoj kaj partoprenantoj, ktp).

b) La Universalaj Kongresoj

Ekde la UK en Varsovio (1959) ĝis la fina malsano, Ada maltrafis neniun universalan aŭ nacian (en la landoj, kie ni vivis) kongreson, sen paroli pri lokaj manifestacioj. Ŝi persone konis la plejmulton de la kongresanoj kaj korespondis kun multaj el ili: ekz. Kristnaske ŝi forsendis centon da bondeziraj kartoĵoj kaj ricevis saman kvanton da ili. Kiam Ada aperis en kongreso, multaj geesperantistoj volis saluti, brakumi, festi aŭ nur koni ŝin; ŝi impresis ĉiujn per siaj gajeco, modesteco kaj societemo. La kunesto kun malnovaj kaj novaj geamikoj ne malhelpis ŝin partopreni en ĉiuj gravaj kunvenoj kaj mem produkti la fotojn por la speciala numero de „Heroldo”.

Esperanto kaj ĝiaj homecaj valoroj pasiigis Ada-n ekde ŝia unua kurso en 1957: la lecionoj de Julio Baghy, tiam blokita en Varsovio pro la hungara revolucio, tiel kaptis ŝin, ke ŝi ploris, kiam ŝi ne povis ĉeesti la kurson. Sekvant-jare ekkomenciĝis la organizado de la Varsovia jubilea kongreso (1959), en kies preparo ŝi-vic-prezidantino de la ĉef-urba E-societo kaj redaktoro ĉe la Esperantaj dissendoj de Radio Varsovio- kunlaboris en la kadro de la Gazetara Servo de LKK.

c) Pollando

Malmultaj personoj amas sian naskiĝlandon, kiom Ada amis Pollandon. La senton plifortigis la milita tragedio de Pollando. Post liberiĝo de la familio el la Siberia ekzilo, Ada-provizore loĝante kaj studante (en polaj lernejoj por rifuĝintoj) unue en Teherano kaj poste en Libano- eksciis pri la sanga Varsovia ribelo kaj romantike bedaŭris ne esti tie por „perei kun miaj samlandanoj”.

Por Ada gravis Pollando kiel lando, spite de tio, ke ĝi postmilite falis sub komunisman reĝimon: por ŝi patrujo sam-valoras kiel patrino, ĝi kunigas la historiajn kaj kulturajn eternajn valorojn de popolo; politika sistemo estas apenaŭ transira negrava fenomeno. Postmilite ŝi kaj la fratino estis unu el la nemultaj gepoloj, kiuj revenis al reĝima Pollando, la patrino reedziniĝis kaj restis en Irano; la tuta armeo de gen. Anders, ekzemple, petis azilon eksterlande. Dum nia 36-jara geedziĝo ne pasis somero, sen ke ŝi veturu al Varsovio kaj libertempu unu monaton kun la familianoj ĉe la polaj lagoj en kampara etoso, kiun ŝi, iama skoltino, aparte ŝatis. Dum tiuj restadoj, en Varsovio sinsekvis renkontiĝoj kaj festoj kun amikoj, fruaj kolegoj kaj esperantistoj, kaj intervjuoj pri Esperanto al la naciaj gazetoj.

La fina malsano

En la lastaj tempoj de la Torina periodo, ŝi kelkfoje plendis pro dorso-doloro dum sidado antaŭ komputilo ĉe la komposta kaj enpaĝiga laboro. Bedaŭrinde, nek ŝi nek mi atribuis gravecon al tio: ni pensis (kaj tion mi nun riproĉas al mi), ke temas pri fenomeno normala ĉe ĉiu, kiu longe sidas kliniĝinte super la taskoj. Por plia komforto ŝi plialtigis la sid-pozicion, aldonante sur la seĝo librojn kaj kusenojn kaj subtenante la dorson per speciala apogilo uzata en aŭtomobiloj. Ŝi ĉesis plendi, sed la malsano silente progresis.

Proksimume unu jaron antaŭ la fino, pro la doloroj ŝi decidis limigi la opajn sidajn tempojn antaŭ la komputilo ĝis po dudekminutojn sinsekve. Sed, ankaŭ tio ne helpis. Kuracisto-ortopedisto mendis radiografiojn, sed rimarkinde en ili neniun malsanon, li konsilis gimnastikon, kio ne havis sencon, ĉar ŝi jam tion faris. Krizo subite eksplodis iun tagon en majo 1996, kiam, revenante de butikumado, la doloro estis tia, ke ŝi surstrate treniĝis sufer-plene 40 minutojn, apogante sin al muroj, por kovri dekminutan distancon ĝis la hejmo.

Ada trovis mildigon apogante sin al lam-bastono kaj daŭrigis siajn agadojn. Ne nur. En sekvantaj tagoj ŝi nepre volis partopreni en la celebroy pri la batalo en Montecassino, kie falis

multaj polaj soldatoj. Se oni pripensas, ke dum tiaj celebroy oni staras horojn-longe ĉe tombejo, por aŭskulti paroladojn kaj mesojn, oni facile imagas ŝian fizikan klopodon. Sed, pri tio ŝi ne plendis.

La definitiva krizo manifestiĝis post kelkaj semajnoj. Mi tiam troviĝis en suda Italio por gvidi seminarion: je mia reveno, mi trovis ŝin kuŝanta en fotelo, ĉirkaŭata de helpemaj geamikoj; la streĉita vizaĝo aspektis kiel masko de doloro. Sufero laŭlonge de la spino kaj speciale ĉe la nuko atingis tian gradon, ke ŝi unu fojon elbuŝigis teruran intencon: „Mi mortigos min!”. Mia koro haltis bati, ĉar ŝi kutimis rekte esprimi nur sian plenan sinceran penson: venantaj el homo, kiu tiel amas la vivon, tiuj vortoj plej krude bildigis la neelteneblan doloron. Feliĉe, tiu frazo ne plu ripetiĝis.

Sekvan tagon, dimanĉon, doktoro vizitis ŝin hejme, provizore diagnozis iskiatikon, preskribis kaj tuj aplikis kontraŭdolorajn injektojn. En la venontaj du tagoj, flegistino regule ripetis la kuracon, kio forigis momente la akutajn krizojn, revekante ŝian optimismon.

Tamen, ŝi apenaŭ povis stari. Ĉe kuŝado iom helpis ŝveligebla kolringa kuseneto, uzata de turistoj dum veturado. Tamen, Ada ne eltenis kuŝi neaktiva: el la lito ŝi plue gvidis la gazetajn kaj hejmajn laborojn.

La trian tagon, per taksio ni veturis al privata specialisto. Aŭdinte la priskribon de la simptomoj, esploriginta la radiografian filmon, li prognozis ostoporozon, nome senkalkiĝon de la ostoj: malsano sufiĉe ofta ĉe mezaĝaj virinoj. Li ordonis absolutan ripozon en lito kaj plue apliki la antaŭajn medikamentojn. Sed, lia granda sperto vekis ĉe li ian dubon: por rea kontrolo, li postulis novan speciale pligrandigitan detalan lokan radiografion, nomatan TAC, kaj petis min telefone legi al li la rezultojn, tuj kiam ili pretos.

- daŭrigota -

Dr. Jáki Ferenc

Paradoxon

Gondolat nélkül az Ember csupán üres csigaház,
csillógó, de haszontalan, fölösleges korall-váz.
Legnagyobb csoda a Földön: a száguldó Gondolat,
büszkén emeld ezért, Ember, Ég felé Homlokodat!
Véges a Léte és a halál sem tartogat semmi jót,
mégis jó, hogy megsejtheted a másik Dimenziót!

D-ro Ferenc Jáki

Paradokso

Sen Penso la homo estas nur helik-konko vaka,
brila, tamen senutila koral-domaro vana.
La plej granda Miraklo sur Ter' estas la fluga Pens',
pro tio leviĝu alten, Homo, via vigla Mens'!
La Viv' ne estas senfina, kaj la Mort' nin atendas,
tamen Vi la Dimension alian antaŭsentas!

(Ferenc Jáki/Marianna Legányi: Kantante Vivi – Énekelve Élni – Szolnok 2006)

ANEKDÓTÁK

Tristán Bernard, francia író és humorista mondta egyszer egy társaságban:

Csak egyetlen ember nem hazudott, amikor azt mondta, hogy nem látott szebb nőt.
Ő volt Ádám!

Fernandel (Fernand Constandin), francia filmszínész elhatározta, hogy vegetáriánus lesz, de hamarosan valaki a barátai közül látta, hogy nagy élvezettel eszi a hússzeleteket.

- Nem mondtad, hogy vegetáriánus leszel? – kérdezte csodálkozva a barát.
- Valóban, én vegetáriánus vagyok! De ma kedd van és kedden nekünk vegetáriánusoknak böjt napunk van!

Anekdóták híres emberekről: Edvard V. Tvarozsek eszperantó nyelvű összeállításából
(Kiadás 1992, Bratislava) kiválogatta és magyarra fordította

Pásztor László

ANEKDOTOJ

Tristan Bernard, franca verkisto kaj humuristo, diris foje en societo:

-Nur unusola viro ne mensogis dirante, ke li ne vidis pli belan virinon. Li estis Adamo!

Fernandel (Fernand Constandin), franca filmaktoro decidis fariĝi vegetarano, sed baldaŭ poste iu el siaj amikoj vidis lin, kiel li kun granda ĝuo manĝas stekojn da viandaĵo.

- Ĉu vi ne diris, ke vi estos vegetarano? – ekmiris la amiko.
- Vere, ja mi estas vegetarano! Sed hodiaŭ estas mardo kaj marde ni vegetaranoj havas Fastotagon!

(ANEKDOTOJ PRI FAMAJ HOMOJ - El la tradukita kompilaĵo de Eduard V. Tvaroĝek - eldonita en Bratislava, 1992)

A hideg kávé

Közkedvelt italaink egyike a *kávé*. Sok féle módon készíthetjük el. Most, a hideg kávé készítését mutatom be, mely kiváló üdítőital.

A Hideg Kávé

Egy pohárban jól összekeverek $\frac{1}{3}$ rész összetört jégkockát, $\frac{1}{3}$ rész erős, édesített főtt feketekávét, $\frac{1}{3}$ rész szódavizet.

Szívószállal kínálom.

Pásztor Lászlóné

La malvarma kafo

La *kafo* estas unu el inter niaj ŝatataj trinkaĵoj. Ni povas pretigi ĝin multmaniere. Nun, mi prezentos la pretigon de la malvarma kafo.

La malvarma kafo

En glaso mi kunmiksas: $\frac{1}{3}$ parton da disrompita glacikubo, $\frac{1}{3}$ parton da forta, dolĉigita kuirita kafo, $\frac{1}{3}$ parton da sodakvo.
Mi surtabligas ĝin per suĉpajlero.

Adrienne, s-rino Pásztor

LÁTOGATÁS

2007. május 2-án Eszperantista Baráti Körünket meglátogatta *Betty Chatterjee* asszony, a koppenhágai Eszperantó Klub elnöknője, aki egyik írásában a dán zsidók történetét dolgozta fel. Látogatása alkalmából közöljük írását.



Betty Chatterjee Miskolc-Lillafüreden a „Király Lajos” Eszperanto Baráti Körtől:
Pásztorné Adriennel.

VIZITO

La 2-an de majo 2007 nian Esperantistan Amikan Rondon vizitis sinjorino *Betty Chatterjee*, prezidanto de la Esperanto-klubo de Kopenhago, kiu en sia iu priskribo prilaboris la historion de la danaj judoj.

Ni publikas ŝian priskribon okaze de la vizito.



Betty Chatterjee en Miskolc-Lillafüred, kun Lászlóné Pásztor de la Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos”

Betty Chatterjee Rövid történet a zsidókról Dániában

Dánia volt az egyik skandináv állam, amely megengedte a zsidóknak a bevándorlást. Az első találkozás a zsidókkal IV. Krisztián uralkodása alatt történt (1588-1648). Akkor történt, amikor a király meghívta a Földközi-tenger vidéki zsidókat Hamburgból és Altónából 1617-ben az újratervezett németországi Gluckstadt városba. A király kinevezte Albert Dioniszt a Földközi-tenger vidéki zsidó kereskedőt a pénverde vezetőjének 1619-ben. Dionisz, aki már Hamburg lakosa volt, lett az első zsidó, aki pártoló dán levelet kapott.

A Dioniszal való jó együttműködés miatt a király elhatározta, hogy más zsidókat is meghív Amszterdamból és Hamburgból Gluckstadtba, hogy javítsák a kereskedelmet. Akkor nagy kereskedelmi verseny létezett Hamburg és Dánia között. Bátorításként a haladó zsidó kereskedőknek a király vallásszabadságot és kereskedelmi előjogokat javasolt Gluckstadtban. Valami előjogot kapott a zsidó lakosság, végül joguk volt szabadon kereskedni magában Dániában is. El is adtak luxUSDolgokat az udvarnak és nagy kölcsönöket adtak a királynak.

1667-ig nem volt könnyű az európai zsidóknak, akik kereskedni akartak Dániában, így nem volt olyan joguk, mint a Földközi-tengeri zsidóknak. Mégis 1667-ben a zsidók Altónából utazhattak is és kereskedhettek Dániában is, beleértve Norvégiát és Schlesweg-Holsteint is. Az első zsidók magában Dániában vagy dohányárukat gyártottak, vagy eladók voltak. Dánia egyik legnagyobb városa Fredericia volt, Jutlandban. 1682-ben a király egyházi jogokat engedett minden lakosnak, emiatt több zsidó érkezett a városba, gazdagok is, szegények is. E korszakban kb. 19 európai zsidó lakott Koppenhágában. Többségük udvari ékszerész. 1684-ben egyikük, Meyer Goldschmidt celebrálhatott miséket de prédikáció nélkül az egész zsidóközösség számára és a következő 50 évben a miséket ott történtek. 1694-ben vásároltak egy parcellát temető céljára. 1695-ben a Földközi-tengeri zsidók is jogosultak lettek a misékre. Mégis az európai zsidók uralták a zsidó közösséget Dániában.

1684 és 1814 között két fontos zsidóközösség volt az országban: Fredericia és Koppenhága. Az első zsinagóga Fredericiában épült 1719-ben. A koppenhágaiaknak 1766-ig kellett várni, amikor az ő első zsinagógájuk fel lett szentelve. Sajnos a nagy koppenhágai tűzvészben 1795-ben az teljesen eltűnt.

A XVIII. században a dán hatóságok szívesen befogadták az országba a gazdag zsidókat, azonban nem látták szívesen a szegényeket. Nekik csak 1726 után volt joguk Koppenhágába költözni, ha volt elég pénzük, kereskedésük, vagy házuk. Kevés zsidó volt ilyen gazdag. Mégis a közösség megszerezte az engedélyeket a külföldi zsidóknak, akik benősülve akartak családot alapítani. 1784-ben 1200 zsidó lakos volt Koppenhágában. Ők csak azokban a szakmákban vehettek részt, amelyekben a céheknek nem volt monopóliumuk. E miatt a fő foglalkozások a pénzes kölcsön, jelzálogkereskedelem, zsib-árus kereskedelem és ivóboltok voltak – 1814-ig hivatalosan azokat „zsidó kereskedelemnek” nevezték. Gyakran történtek ellentétek a céhes és kereskedelmi jogok között. Mégis a kormány gyakran támogatta a zsidókat a céhekkel való ellentétei miatt is és a kereskedelmi fejlődés érdekében is. A XVIII. században a kormány a zsidóknak sok előjogot adott: pénzadományokat, kölcsönöket a gyárak építéséhez, adókönyvitést és egyeduralmat. A korszak második részében ment végbe a dán tengeri és gyarmati kereskedelem terjeszkedése, e miatt a zsidó kereskedők sikeresek lettek.

Még ha a kormánynak pozitív véleménye is volt a zsidókról, a céhek és templomok ellenségesebbek voltak. A céhek félték a zsidó kereskedőtudástól és műveltségtől, és meg voltak győződve, hogy a zsidók makacsul tagadták a megfelelő utat. A XVIII. szd. elejére több fantazmagóra javasolt zsidóellenes tervezeteket, például gettókat, zsidó jelvényeket, zsidóadót. E korban történtek zsidónépellenes erőszakok is. Mégis a kormány támogatta a zsidókat, tagadván a megkülönböztető törvények bevezetését, és a rendőrség nem tűrte az erőszakot mondván, mindenkinek joga van a törvényadta támogatásra. Habár a kormány és a rendőrség barátságos volt, az egyház elítélte a zsidóságot. 1530 óta az egyedüli elfogadott vallás Dániában a luterán hit volt és volt luterán állami templom. 1728 - ban a koppenhágai egyház hiába erőltette a zsidó részvételt a templomi misén. 1747-től 1864-ig a zsidóknak közösen kellett hűséget esküdni a zsinagógában a városi bíró és rabbi előtt. 1788-ig csak luteránok jelentkezhettek orvosi egyetemre, ezért a zsidók vitatkoztak az egyetemmel annak megváltoztatása érdekében.

Az információs mozgalom Európában befolyásolta a dán zsidó közösséget is, a XVIII. sz.d. utolsó 10 évében. Új eszmék miatt történtek megszorítások a szociális csoportok között a zsidó közösségben. A szegények ellenezték az új eszméket. A kereskedő osztályokat szívesen látták és 1796-ban a reformerek a dán vezetőségből reformokat javasoltak:

1. A zsidók alkalmazkodnának a dán törvényekhez, az állami templomi törvények kivételével.
2. Protokollok és más irományok lennének írottak a dán nyelvben.
3. A vezetőség növekedne és az egész közösség választaná annak tagjait.

Ezek a javaslatok nem tetszettek a zsidó közösségnek és emiatt a vezetőség semmit sem valósíthatott meg. Mégis apránként a zsidók már két jogot kaptak: 1788-ban jelentkezhetek a céhekbe és 1799-ben a főiskolákra. És ugyanazon évben földet vásárolhattak. 1805-ben és 1810-ben a gazdagok átadták a szegények számára a Karolina Iskolát (Carolineskolen). Karolina volt VI. Frigyes király lánya. A Karolina Iskola még létezik, mint az egyedüli zsidó iskola Dániában.

1804-ben királyi dekrétum adott egyenlő jogokat a zsidóknak. E korban más etnikai csoportok gyanakvóak a zsidókkal szemben és félnek azok hatalmától. Emiatt időről időre történtek zsidóellenes események, pl. 1813-ban, amikor egy személy dánra lefordított egy német zsidóellenes könyvet. De sok fontos személy védte a zsidókat. 1819-ben újból voltak „hep-hep” csödületek Németországban, amelyek Koppenhágáig terjedtek ki. A vezetőség újból felülmúlta ezeket a csödületeket.

Magukban a közösségekben is léteztek ellentétek az ortodoxok és haszkálok között. De 1829 óta Ábrahám Alexander Wolff, a rabbi főrabbi lett Koppenhágában és 60 év alatt egyesítette a közösséget, pl. 1833-ban az új zsinagóga felépítésével, amely a dán zsidók leghasználhatóbb találkozóhelye maradt. Fontos lépése volt, hogy megoldotta az ellentéteket a szabad gondolkozók és ortodoxok között. Sikert jót kapcsolatot létrehozni a nem zsidókkal is. Mégis a XIX. században az egyenlő jogok és érdekházasságok miatt sok zsidó aktívan és értékesen részt vett nem zsidó közösségekben, pl. Georg Brandes az író, kereskedő és műgyűjtő Heinrich Hirschprung, Leopold Rosenfeldt a zeneszerző és különböző tudósok, politikusok. Az évszázad végére a közösségnek kb. 3500 tagja volt, hasonlóan az 1834. évi 4000 taghoz.

Az Oroszországban levő pogromok miatt (pl. a Kishinev-pogrom 1903.) a XX. század elejére több ezer zsidó vándorolt be Dániába. Kezdetben az új tagok féltek a bevándorlás következményeitől. A gazdag nyugati és laikus régiek különböztek az újaktól, akik jidisül beszéltek és gyakran továbbra is fontosnak tartva gyakorolták a vallást. Mégis apránként erősítették a közösséget a zsidó kultúra megújításával. Más eredmény volt a közösség növekedése, amely 1921-re 6000 főre gyarapodott.

A 30-as években és a háború alatt a zsidó menekültek Németországból Dániába emigráltak. De a munkanélküliség miatt csak nehezen kapták meg a bevándorlási engedélyeket, és emiatt sokuknak nem sikerült Dániába menni.

1940. április 9-től 1943. októberéig kb. a 8000 zsidó nyugodtan élt Dániában. Addig a dánok kerülték az ellentéteket a németekkel az 1940. évi dán-német egyezmény miatt. Mégis apránként a dán ellenállási mozgalom fejlődött, és emiatt 1943 szeptemberében a németek kinyilvánították a háborús törvényt. Így az egyezmény nem létezett tovább. Werner Best, aki a német vezetőség képviselője volt Dániában, már tervezte a dán zsidók letartóztatását. Mégis egy másik német diplomatának F. G. Dukwitznak, akinek jó kapcsolatai voltak a dán politikusokkal, titkosan informálta az ellenállási mozgalom tagjait a zsidók tervezett tömeges letartóztatásáról. Az ellenállók a halászhajókkal rögtön megrendezték a 7200 közösségi tag megmentését tengerentúli halászhajós svédországi utazással. 500 zsidót elkaptak és küldtek Theresienstadtba.

A háború alatt csak 120 dán zsidó pusztult el a holokauszt miatt. 1945-ben hazajöttek és újrakezdtek a nyugodt életmódot. A nem zsidó szomszédok gyakran gondoskodtak ügyeikről a svédországi tartózkodás alatt.

A dán zsidók nagyon hálásak a háború alatt kapott nagyon szívélyes és bátor segítség miatt, ezért a viszony jó a zsidók és nem zsidók között. A háború után történt a zsidók bevándorlása Magyarországról 1956-ban, Csehszlovákiából 1968-ban, Lengyelországból 1969-72-ben (2000 fő), és izraeliek is stb. Jelenleg a lakosság még számol 6-7000 főt és csak 1 % lakik Koppenhágán kívül.

E nagyvárosban van:

Nagy zsinagóga (1833-ból) 2400 taggal, rabbija Bent Lexner

Fejlődő zsinagóga (Északi dal)

Ortodox zsinagóga – szertartásos fürdéssel

A „Chabad” mozgalom Dániában aktív

Zsidó Iskola – Karolin Iskola

Két éves dán zsidó muzeum, melynek építészé Daniel Libeskind volt, aki a berlini zsidó muzeumot is tervezte.

A Királyi Könyvtárban van a Havas Gyémántnak nevezett nagy könyvkötet a zsidó témákról, amelyben 40 000 könyv van héber, jida, ladina, dán és más nyelveken.

Sok különböző klub létezik a közösségben, pl: W. I. Z. O /női nemzetközi cionista szervezet/, B'nai Brith nyugdíjas klub és centrum, New Outlook / béke-mozgalom /, stb.

-folytatás következik-

Eszperantóból magyarra fordította Pásztor László

Betty Chatterjee

Mallonga historio pri la Hebreoj en Danio

Danio estis unu el la tri skandinavaj landoj, kiu permesis la enmigradon al la Hebreoj. La unua renkonto kun la Hebreoj okazis dum la regado de Kristiano, la 4-a (1588-1648). Tiu okazis, kiam la reĝo invitis la Sefardulojn el Hamburgo kaj Altona al la novplanita/1617/urbo Gluckstadt en Germanio. La reĝo nomumis sefardan hebrea komerciston, Albert Dionis monfarejestro (estro de monfarejo) en 1619. Dionis, kiu jam estis loĝanto en Hamburgo, fariĝis la unua Hebreo, kiu ricevis danan leteron de protekto.

Pro la bona kunlaboro kun Dionis la reĝo decidis inviti aliajn Hebreojn el Amsterdamo kaj Hamburgo al Gluckstadt, por ke ili plibonigu la komercon. Ekzistis tiam granda komerca konkurenco inter Hamburgo kaj Danio. Por kuraĝigi la prosperajn hebreajn komercistojn, la reĝo proponis liberecon de religio kaj la komercadajn privilegiojn en Gluckstadt. Iom post iom la hebrea loĝantaro ricevis pli da privilegioj kaj finfine ili rajtis libere komerci en Danio mem. Ili ankaŭ vendis luksaĵojn al la kortego kaj disponigis grandajn pruntojn por la reĝo.

Ĝis 1667 ne estis tiel facila afero por la aŝkenazaj Hebreoj, kiuj volis komerci en Danio, tiel ili ne havis tiujn rajtojn kiel la Sefarduloj. Tamen en 1667 la Hebreoj al Altono ankaŭ rajtis vojaĝi kaj komerci en Danio inkluzive Norvegio kaj Schleswig-Holsteinon. La unuaj Hebreoj en Danio mem aŭ fabrikis la tabakaĵojn, aŭ estis vendistoj. Unu el la plej grandaj urboj en Danio estis Fredericio en Jutlando. En 1682 la reĝo donis religiajn rajtojn al ĉiuj loĝantoj, pro tio alvenis pli da Hebreoj kaj riĉuloj kaj malriĉuloj en la urbon.

En tiu epoko loĝis proksimume 19 aŝkenazaj Hebreoj en Kopenhago. Pluraj el ili estis kortegaj juvelistoj. En 1684 unu el ili Meyer Goldschmidt rajtis celebri diservojn, sed sen prediko, por la tuta hebrea komunumo ĉe li kaj dum la sekvontaj 50 jaroj la diservoj okazis tie. En 1694 oni aĉetis parcelon por tombejo. En 1695 ankaŭ la sefardaj Hebreoj ricevis rajton havi sur diservojn. Tamen la Aŝkenazuloj superregis la hebrea komunumon en Danio.

Inter 1684 kaj 1814 estis du gravaj hebreaj komunumoj en la lando: Fredericio kaj Kopenhago. La unua sinagogo estis konstruita en Fredericio en 1719. La kopenhaganoj devis atendi ĝis 1766, kiam sia unua sinagogo estis konsekrita. Bedaŭrinde dum la granda kopenhaga incendio en 1795 ĝi tute malaperis pro incendio.

Dum la 18. jc. la danaj aŭtoritatoj bonvenigis al la lando la riĉajn hebreojn kaj ne volonte akceptis la malriĉulojn. Ili havis rajton nur post 1726 por enloĝiĝi en Kopenhagon, se havis sufiĉe da mono, posedis komercon, aŭ domon. Malmultaj hebreoj estis tiel riĉaj. Tamen la

komunumo akiris la permesojn al la eksterlandaj Hebreoj, kiuj volis enedziĝante fondi familion. En 1784 estis 1200 hebreaj loĝantoj en Kopenhago. Ili povis partopreni nur en tiuj metioj, en kiuj la gildoj ne havis monopolojn. Pro tio la ĉefaj profesioj estis mona pruntedonado, hipoteka komerco, brokanta-vestaĵ- komerco kaj trinkaĵvendejoj, – ĝis 1814 oni nomis oficiale tiujn „hebreaj komercoj”. Ofte okazis konfliktoj inter la gildaj rajtoj kaj la komercistaj rajtoj. Tamen la registaro ofte subtenis la Hebreojn kaj pro siaj propraj konfliktoj kun la gildoj kaj por la intereso de la komerca progreso. Dum la 18-a jc. la registaro donacis al la Hebreoj multajn privilegiojn: mondojn, kreditojn por konstruado de fabrikoj, impostan faciligon kaj monopolion. En la dua parto de tiu epoko okazis la ekspansio de la dana mara kaj kolonia komerco kaj pro tio la hebreaj komercistoj prosperiĝis.

Eĉ se la registaro havis pozitivan opinion pri la Hebreoj, la gildoj kaj la preĝejo estis pli malamikaj. La gildoj timis pri la hebrea komerca kapablo kaj edukiteco, kaj la klerikaro estis konvinkita, ke la Hebreoj obstine neis la ĝustan vojon. Je la komenco de la 18-a jc. pluraj fantaziemuloj proponis kontraŭsemitajn projektojn, ekz. getojn, hebreajn insignojn kaj hebrean imposton. En ĉi tiu epoko okazis ankaŭ perfortoj kontraŭ la juda popolo. Tamen la registaro subtenis la Hebreojn, rifuzante la enkondukon de la diskriminaciaj leĝoj kaj la polico ne toleris la perfortojn, dirante, ke ĉiuj rajtas pri protekto laŭ la leĝo. Kvankam la registaro kaj la polico estis amikeca, la eklezio oponadis la hebreraron. Ekde 1530 en Danio la luterana kredo estis la sola akceptita religio kaj ekzistis ŝtata luterana preĝejo. En 1728 la kopenhaga klerikaro vane povis devigis la hebrean partoprenon en la preĝeja diservo. Ekde 1747 ĝis 1864 la hebreoj devis publike ĵuri la fidecon al la lando en la sinagogo antaŭ la urba juĝisto kaj la rabeno. Ĝis 1788 nur la luteranoj rajtis aliĝi al la medicina fakultato, tial la hebreoj disputis kun la universitato por ŝanĝi tion.

La informada movado en Eŭropo influis ankaŭ la danan hebrean komunumon dum la lastaj dek jaroj de la 18-a jc. Pro novaj ideoj okazis severigoj inter la socialaj grupoj en la hebrea komunumo. La malriĉuloj oponis la novajn ideojn. La komercistajn klasojn oni bonvenigis kaj en 1796 la reformuloj el dana estraro proponis reformojn:

1. Hebreoj estonte konformiĝus pri la danaj leĝoj, escepte la ŝtatajn preĝejajn leĝojn.
2. Protokoloj kaj aliaj skribaĵoj estus skribotaj en la dana lingvo.
3. La estraro pligrandiĝus kaj la tuta komunumo elektus ties anojn.

Tiuj proponoj ne plaĉis al la hebrea komunumo kaj pro tio la estraro efektivigis nenion. Tamen iom post iom la hebreoj jam ricevis du rajtojn:

En 1788 ili rajtis aliĝi al la gildoj kaj en 1799 al la altlernejoj. Samjare ili rajtis aĉeti la teron. En 1805 kaj en 1810 la riĉuloj en la komunumo inaŭguris Karolinan Lernejon (Carolineskolen) por la malriĉuloj. Karolina estis la filino de la reĝo Frederik, la 6-a. La Karolina Lernejo ankoraŭ ekzistas, kiel la sola hebrea lernejo en Danio. En 1804 la reĝa dekreto donis egalajn rajtojn al la Hebreoj. En ĉi tiu epoko la aliaj etnaj grupoj estas suspektemaj pri la Hebreoj kaj ili timis pri la potenco de ili. Pro tio de tempo al tempo okazis kontraŭsemitaj eventoj, ekz. en 1813, kiam iu je dana lingvo tradukis germanan libron kontraŭsemitan. Sed multe da gravaj personoj defendis la Hebreojn.

Denove en 1819 okazis „hep-hep tumultoj” en Germanio, kiuj etendis ĝis Kopenhago. La estraro denove subpremis tiujn tumultojn.

Ankaŭ en la komunumoj mem ekzistis konfliktoj inter la ortodoksuloj kaj haŝkaluloj. Sed ekde 1829 la rabeno Abraham Aleyander Wolff fariĝis ĉefrabeno en Kopenhago kaj dum sesdek jaroj li unuigis la komunumon, ekz. per la konstruado de nova sinagogo en 1833, kiu restis la plej uzata renkontejo de la danaj Hebreoj. Li havis grandan talenton por solvi la konfliktojn inter la liberpensuloj kaj ortodoksuloj. Li sukcesis realigi bonajn rilatojn ankaŭ kun la nehebreoj. Tamen dum la 19-a jc. pro la egalaj rajtoj kaj la interedziĝoj multe da hebreoj aktive kaj valore partoprenis en la nehebrea komunumo, ekz. la verkisto Georg

Brandes, la komercisto kaj la artkolektanto Heinrich Hirschprung, la komponisto Leopold Rosenfeldt, diversaj sciencistoj kaj politikistoj. Fine de la jarcento la komunumo nombris ĉ. 3500 membrojn kompare kun la 4000 membroj en 1834.

Pro la pogromoj en Rusio komence de la 20-a jc. /ekz. Kiŝinev pogromo en 1903/ enmigradis pluraj miloj da Hebreoj en Danion. Komence la malnovaj Hebreoj timis pri la konsekvencoj de la enmigrado. La riĉaj okcidentaj kaj laikaj malnovuloj diferencis de la novuloj, kiuj jide parolis kaj ofte pli grave praktikis la religion. Tamen iom post iom fortigis la komunumon per la renovigo de la hebrea kulturo. Alia rezulto estis la kresko de la komunumo, kiu nombris 6000 personojn en 1921.

En la tridekaj jaroj kaj dum la milito hebreaj rifuĝintoj migris el Germanio en Danion. Sed pro la senlaboreco estis tre malfacile havigi la enirajn permesojn, kaj pro tio sufiĉe multaj personoj ne sukcesis eniri Danion. Ekde la 9-a de aprilo 1940 ĝis oktobro 1943 la ĉ. 8000 hebreoj en Danio trankvile vivis. Ĝis tiam la danoj evitis la konfliktojn kun la germanoj pro la dana-germana kontrakto 1940-jara. Tamen iom post iom la dana rezista movado evoluiĝis kaj pro tio en septembro de 1943 la germanoj deklaris la militleĝon. Tial la kontrakto ne plu ekzistis. Werner Best, kiu estis la reprezentanto de la germana estraro en Danio, jam planis la areston de la danaj Hebreoj. Tamen alia germana diplomato en Danio F.G. Dukwitz, kiu havis bonajn rilatojn kun la danaj politikistoj sekrete informis la membrojn de la rezista movado pri la planota amasaresto de la Hebreoj. La rezistanoj kunlabore kun la fiŝistoj tuj aranĝis la savon de la 7200 komunumanoj per transmare fiŝŝipa veturo al Svedio. 500 Hebreoj estis kaptitaj kaj senditaj al Theresienstadt. Dum la milito nur 120 danaj Hebreoj pereis pro la holokaŭsto. En 1945 ili revenis hejmen kaj rekomencis la trankvilan vivmanieron.

La nehebreaj najbaroj ofte zorgis pri iliaj aferoj dum la restado en Svedio.

La danaj Hebreoj estas tre dankemaj pro la bonkora kaj kuraĝa helpo ricevita dum la milito, pro tio la rilatoj inter Hebreoj kaj ne Hebreoj estas bonaj. Post la milito okazis enmigradoj de Hebreoj el Hungario en 1956, el Ĉeĥoslovakio en 1968, el Pollando en 1969-72 (2000 personoj), kaj ankaŭ israelanoj ktp.

Nuntempe la loĝantaro ankoraŭ nombras 6-7000 personojn kaj nur 1 % loĝas ekster Kopenhago.

En ĉi tiu urbego estas:

La granda sinagogo (el 1833) kun 2400 membroj, ties rabeno nomiĝas Bent Lexner

La progresiva sinagogo (Norda kanto)

La ortodoksa sinagogo, ki havas ritan banon (mikva)

La „chabad” movado estas aktiva en Danio.

La hebrea lernejo: Carolina Lernejo

La dujara dana hebrea muzeo, kies arkitekto estis Daniel Libeskind, kiu planis ankaŭ la hebrean muzeon en Berlino.

En la Reĝa Biblioteko troviĝas ankaŭ nomata la Neĝa Diamanto granda libraro de hebreaj temoj, kiu enhavas 40 000 librojn en hebrea, jida, ladina, dana. kaj en aliaj lingvoj

Ekzistas multaj diversaj kluboj en la komunumo, ekz. V. I. Z. O. /Virina Internacia Cionista Organizo/, B’nai Brith, pensiula klubo kaj Centro, New Outlook /paca movado/, ktp.

- daŭrigota -

A békakirályfi

Hol volt, hol nem volt, talán mégsem mese volt, hogy volt egyszer Zánkán egy eszperantó iskola, ahol eszperantista aktivisták továbbképzését végezte a Magyar Eszperantó Szövetség.

Dr. Győry-Nagy Lajos bácsi, Eszperantó Megyei Bizottságunk elnöke úgy döntött, hogy Miskolcra Lőrinczi József, Pásztor László és én (Földi Adrienne) vegyünk részt ezen a továbbképzésen 1972 nyarán.

A jelentkezési lapokat mindenkinek magának kellett a címre megküldenie Lajos bácsi ráírott javaslatával. Mivel a nyomtatványt kibocsátó a MESZ volt, nem a zánkai címre, hanem Budapestre a MESZ-hez küldtem el Zánka helyett a jelentkezési lapot. Azt gondoltam ugyanis, hogy azokat az összegyűjtés után ők fogják továbbítani Zánkára.

Amikor Lajos bácsinak elmondtam, hogy az ott tartózkodásom alatt még a helyi nevezetességeket is meg akarom nézni, mármint a fakazettás plafonú fatemplomot és a vörös forrást, igencsak lehűtötte a lelkesedésemet azzal a ténnyel, hogy a sűrű program miatt egyéni kirándulásra aligha lesz időm.

Körülbelül a Balaton északi partjának feléig utaztam, amikor megérkeztem Zánkára, mely akkortájt nem az eszperantó iskola, hanem az úttörőtábor miatt volt híres. Szóval, a címet megtaláltam aztán sorbaálltam. A fogadóbizottság előtt aztán kiderült, hogy a listán sajnos nincs rajta a nevem, így sem szállás, sem más nincs rendezve a részemre.

Miután megmutattam a MESZ címére küldött ajánlott levelem postai igazoló papírját, nagyon udvariasan azt ajánlották nekem, menjek el sétálni. Amikor egy-két óra múlva visszajövök, addigra már biztosan megnyugtatóan rendeződik jelentkezésem és regisztrálásom ügye.

Más se kellett nekem. Szépen elindultam, hogy mégis megismerhessem Zánka nevezetességeit. Ha nem is az úttörőtábort, de legalább a kis templomot és a vörös forrást.

Jó emberek útbaigazítottak elmagyarázva, hogy melyiket merre fogom megtalálni.

Könnyedén megtaláltam a kis templomot. Mely, sajnos már nem látható, mivel egy nagy esőzés után a falai annyira megrogyantak, hogy le kellett bontani az épületet. Az utca felől nem volt látható.

Amikor a portára beléptem, az udvar közepén egy löcsös szekér rúdján lószerszám csüngött. A kukoricaszárító nyitott ajtaján ki-be röpködtek galambok, rigók, verebek. Nem mintha kukoricára gyűltek volna össze. Nem bizony, az már nem volt benne, de volt ott kiömölve egy zsák árpa.

Ember sehol. Egy kicsit hallóztam, aztán vártam, majd kissé onnan eltávolodva ismét hallóztam, de kissé már hangosabban.

Nemsokára valahonnan hátulról egy menyecske jött elő meszesen. Szaporán szabadkozott. Azért nem hallotta meg jöttömet, mivel hátul a tyúkólat meszelte – és intett valahova a távolba. Kérdésemre készségesen vezetett át a másik portára, ahol a férje a tapasztott, vert falú favázas kis templom ajtófélfáját festette olajfestékekkel tengerzöldre.

A templomka mellett terebélyes lombú fa és egy magas kerítés állott. Ezért nem lehetett látni az utcáról a kis templomból semmit.

Eredetileg, - mesélte a fiatalasszony – a kis templom a település szélén volt, de miután a lakosok a háború után építkezésbe kezdtek, beszorult a két ház közé.

A mésszel fehérített falú templom kívül is, belül is kicsike volt, de elég volt a lakosoknak. Amíg az Úrhoz könyörögtek, vagy inkább hálát rebegtek, addig nem fújta őket a szél, nem zuhogott nyakukba az eső. A picinyke, egyszerű templomnak is volt éke, értéke: a virágokkal ékesített, faragott, kazettás fa mennyezete.

Megtekintése után elindultam visszafelé, végig az úttörőtábor kerítése mentén, ki a faluból. A vasúti sínen túljutva találtam meg az olyan hön látni óhajtott vörös forrást.

Megdöbbenésemre, egy közönséges kerek luk volt a földben, amelyből akkor egy kevéske vörös víz szivárgott ki. No, már majdnem azt gondoltam, hogy ezért ugyan kár volt odamennem és annyit gyalogolnom. És, akkor csoda történt.

Nagy buborékot öklendezett ki magából a föld és ez még háromszor megismétlődött. A buborék leve a benne oldott vas és mangán vegyületektől vörös volt és sűrű, mint az öreg emberek vére. Nem hiába mondta a népnyelv erről a forrásról, hogy "Vérforrás".

Az öklendezés után ismét nyugalmi időszak következett. Megvizsgáltam a vizet. Megállapítottam, hogy a víz nem meleg. Nem vártam meg a további öklendést, hanem igen elégedetten megindultam az eszperantó iskola felé.

Odaérve tapasztaltam, hogy bár már délután volt, a jelentkezők még mindig igen sokan voltak. Nem kívántam a sorba újra beállani. Így, lementem a kert végébe a Balatonhoz.

A kerítésen túl, öreg szomorúfűz ágai nyújtóztak a vízig. Közelében csónak volt kikötve. Félig a parton, félig a vízben feküdt. Beleléptem, leültem. A csend, a félárnyék kellemes volt. Elővettem a faluban vásárolt zánkai képeslapot és megcímeztam édesanyámnak. Még indulásom előtt megfogadtatta velem, hogy azonnal az érkezésem után megírom neki hogyan utaztam, milyen az elhelyezés, milyenek a társak, stb.

Elgondolkodtam. Azt nem írhatom meg, hogy nincs rendben a szénám, mert feleslegesen nyugtalanítanám szegényt. Akkor mit írjak? Amikor idáig jutottam a gondolatomban, hirtelen megcsobbant a csónak alján levő víz előtt. Odanéztem és a lélegzetem majd elállott. Egy óriási béka nézett velem farkas szemet. Azt hiszem, mindketten meglepődtünk. De mivel én moccanni sem mertem, hogy az állatot el ne riasszam, megnyugodott és mivel éhes volt, éhsége csillapítása volt számára a legfontosabb mindennek előtt.

A ladik alján levő vízbe belefulladt légy, pók és dongó elfogyasztása után már nekem szentelte minden figyelmét. Sokáig szemlélt. Mikor már eltelt a látásom, - éppen akkor, amikor édesanyám lapjára azt írtam, hogy most láttam meg életem legnagyobb békáját és alighanem ez lehetett a békakirályfi, – gondolt egy nagyot, merészet a béka. Átvette magát a csónak oldalfalán és eltűnt a buja víz alatti világban, ahonnan jött.

Utána, csak egy széles kör maradt a víz színén, mely mutatta, hol merült a víz alá. Utána néztem, amikor a víztányéron egy kedves fiatal férfiarc jelent meg / későbbi férjemé/ Pásztor Lászlóé. Mondta, most már jelentkezhetek nyugodtan, mert Budapestről a MESZ-től leigazolták a jelentkezésemet. Minden rendeződött.

Készülhettem a vacsorára és az utána következő ismerkedési estre.

Pár nap múlva hallottuk, hogy a közeli kecskebéka tenyésztő telepről sikerült lelépnie néhány tenyészállatnak és emiatt komoly kára keletkezett a tulajdonosoknak.

Így értesültem arról, hogy a „békakirályfi” honnan származott el.

Ezt a hírt hallva jutott eszembe a mulatós magyar nóta:

„Kecskebéka felmászott a fűzfára,
annak is a legmagasabb ágára.
Így sem volt jó, úgy sem volt jó,
sehogyan sem volt az jó.
Mindig csak a más asszonya volt a jó.”

La ranreĝido

Kie estis, kie ne estis, tamen ne fabelo estis: la ekzisto de la HEA lernejo ĉe vilaĝo akvoborda, apudbalatona Zánka.

En Zánka, la Hungara Esperanto-Asocio aranĝis pliperfektigan kurson kun prelegoj de eminentaj hungaraj esperantistoj por aktivuloj de la hungara Esperanto-movado. Inter la prelegantoj estis ekzemple: D-ro Jozefo Mátéffy, D-ro Stefano Szerdahelyi, s-ino Éva Farkas-Tatár, s-ro Ottó Nógrádi kaj ankoraŭ ankaŭ multaj aliaj.

D-ro Ludoviko Györy-Nagy, la prezidanto de nia Boršos-Abauj-Zemplén departamenta Esperanto Komitato decidis, ke el Miskolc, tiun pliperfektigan kurson partoprenu sinjoroj Jozefo Lőrinczi kaj Ladislao Pásztor, krome mi (Adrienne Földi) dum somero de 1972.

La aliĝilon ĉiu mem devis sendi al la donita adreso kune kun la skriba propono de nia prezidanto.

La eldonanto de la aliĝilo estis HEA, do tial mi sendis ĝin al Budapeŝto (al rezidejo de HEA) anstataŭ Zánka. Mi pensis, ke HEA kolektos la aliĝilojn kaj poste sendos ilin al Zánka.

Kiam mi parolis al oĉjo Ludoviko, ke dum mia tiea restado mi volas viziti la vidindaĵojn de Zánka: la kasedan ligno-plafonan preĝejon kaj la ruĝan fonton, li multe malvarmigis mian entuziasmon per tiu fakto, ke pro la densa programo mi certe ne havos tempon por fari ekskurson ien ajn.

Nu, mi vojaĝis per trajno laŭ la bordo de lago Balatono, preskaŭ ĝis la mezo de ĝia norda bordlongo, kaj en la decidita tempo mi alvenis en Zánka. Tiutempe tiu loko estis fama ne pro la tiea Esperanto-lernejo, sed pro la Pionira tendaro.

Do, mi alvenis, trovinte la adreson, kaj sinanoncis ĉe la akceptejo.

Sed, tie evidentiĝis, ke mia nomo ne estas trovebla sur la nomlisto. Do, oni ne povas akcepti kaj tranoktiĝi min. Kiam mi montris al ili mian poŝtan papereton pri la dokumento sendita al HEA en Budapeŝton, la akceptantoj tre ĝentile proponis al mi, ke mi iru promenadi. Se mi revenos post unu-du horoj, je tiu tempo certe jam trankvilige aranĝiĝos mia afero inter la oficejo de HEA kaj Zánka.

Mi ĝoje iris for al la vilaĝo, por tamen viziti la sopiratajn vidindaĵojn.

Bonaj homoj klarigis, kion kie mi trovos. Tiel, unue mi serĉis la malgrandan preĝejon. Kio estas nevidebla nun jam bedaŭrinde, ĉar ĝiaj muroj malfortiĝante teren falis post longdaŭra pluvego kaj tial oni devis malkonstrui la konstruaĵon.

De sur la strato ĝi ne estis videbla. Kiam mi eniris la korton, sur mezo de la korto ĉaro staris, sur ĝia timono pendis jungilaro. La pordo de la maizsekiĝilo estis malfermita. Kvankam ene maizo ne estis, tamen en- kaj elflugadis kolomboj, paseroj kaj turdoj. Ili rapide flugadis tien-reen sur la elŝutiĝintan hordeosakon. Homon mi ne vidis. Mi ekkriadis hola, hola! Respondo ne venis. Mi ripetis, sed iome pli laŭte kaj atendis plu.

Baldaŭ junedzino aperis je mia kriado, kaj pardonpetis, ke ŝi ne aŭdis mian alvenon. Ŝia vestaĵo kalka estis. Tial aspektis tiel, ĉar ŝi pentris la staleton de gekokoj per kalko – klarigis ŝi kaj mansignis ien pli malproksimen. Je mia peto ŝi tre volonte akompanis min en la alian korton, kie ŝia edzo pentris per oleofarbo al marverda koloro la pordon kaj la pordofoston de la lignoskema, batita-ŝmirita argilmurojn havanta preĝejeto. Apud la etpreĝejo vastfoliara arbo kaj alta barilo staris. Oni tial povis vidi neniom el la malgranda preĝejo de la flanko de vilaĝstrato. Originale, - rakontis la junedzino – la preĝejo staris ĉe la rando de la setlejo, sed post la dua mondmilito, kiam la loĝantaro komencis konstruadi, ĝi enpremiĝis inter du domojn. La preĝejo blankigitmura per kalko estis malgranda kaj interne, kaj ekstere, sed sufiĉis por la loĝantaro, por tiuj kelkaj animoj, kiuj dum ilia petego, aŭ dum la dankodiro al Dio, la vento ne trablovigis ilin, pro la pluvo ili ne tramalsekiĝis. Tegmento estis super ili.

Ankaŭ la tre eta preĝejo havis ornamon, valoron. Tiu estis ĝia per floroj ornamita lignoskulptita kaseda lignoplaĥono.

Post ĝia rigardo mi ekiris reen, ĝis fino laŭ la barilo de la pionira tendaro, eksteren el la vilaĝo. Mi trapasinte la fervojajn relparojn, baldaŭ ektrovis tiun por vidi tre sopiritan „ruĝan fonton”.

Sed, kiel granda seniluziiĝo estis ties ekvido! Ĝi estis tute ordinara ronda truo en la tero, el kio ioma ruĝa akvo trafiltiĝis eksteren. Mi tute ne trovis ĝin interesa. Preskaŭ jam tion mi ekpensis, kial mi venis ĉi tien, mi bedaŭras mian marŝon ĉi tien, kiam miraklo okazis.

Unu post la alia trifoje grandan bobelon devomis la truo, sed kian! Ĝi estis malhelruĝa, ĝia suko estis densa kiel sango de maljunaj homoj pro la enŝoviĝintaj fero- kaj manganaj kombinaĵoj! La popoldiro nomis la fonton vere ĝuste „Sangofonto”. Post la vomado denova kvieta paŭzo sekvis. Mi konstatis dume, ke la akvo ne estis varma. Mi ne atendis la novan vomadon, sed tre kontente ekiris al la Esperanto lernejo.

Vidinte, ke tie ankoraŭ ankaŭ tiam longa vico staras antaŭ la akceptejo, mi ne volis denove enviciĝi. Tial mi iris al la bordo de la lago Balatono, kiu estis tuj ĉe la fino de la teritorio de la Esperanto- lernejo. Sur la bordo ĉe la barilo maljuna tristsaliko pendbalancis branĉojn al la akvo. Aliflanke boato estis ligita al tero tiel, ke ĝi kuŝis duone sur la bordo, duone en la akvo. Mi eniĝis, sidiĝis. Agrable estis sidi en la posttagmeza duonlumo. Mi prenis la bildkarton de Zánka, aĉetitan en la vilaĝo kaj adresis ĝin por mia panjo. Sed, dume mi devis pripensi, kion skribi. Antaŭ foriro de mia hejmo, mi devis promesi al mia panjo: post mia alveno mi tuj skribos al ŝi pri la vojaĝo, tranoktejo, gekunuloj ktp. Mi ne povis skribi al panjo, ke mi ne havas tranoktejon. Kial mi maltrankviligu ŝin? Do, pri kio mi skribu?

Kaj tiam subite io ekplaŭdis antaŭ mi en akvo de la boatsubo. Mi rigardis tien kaj preskaŭ haltis mia spiro. Grandega rano fikse rigardis en miajn okulojn. Mi pensas, ni ambaŭ surpriziĝis. Ne volante moviĝi por, ne forpeli la animalon, mi sidis silente. Do mi sidis kaj nur el okulanguloj rigardis la beston.

Ĝi estis plie malsata, ol timema. Pli grava estis por ĝi forpeli sian malsaton, ol okupiĝi pri mia ĉeesto. Do, post formanĝo de la boatakvo dronintaj muso, araneo kaj burdo, ĝi ekrigardis min pli pedante. Tian grandegan ranon pli frue mi neniam vidis en mia vivo. Singarde mi skribis sur la bildkarton, ke mi nun vidis la plej grandan ranon de mia vivo, kaj eble ĝi estas mem la ranreĝido.

Sed, kiam la ranego pensis: sufiĉas jam mia rigardo, traĵetis sin sur flanko de la boato kaj malaperis en la abundkreska subakva mondo, el kie ĝi venis. Larĝa rondo signis la lokon sur la akvosurfaco, kie ĝi subakviĝis. Dume mi postrigardis la ranreĝidon, sur la loko de la subakviĝo aperis kara juna virvizaĝo de (mia posta edzo) Ladislao Pásztor. Li invitis min reiri, ĉar intertempe aranĝiĝis mia anonciĝa afero. HEA pruvis mian perpoŝtan aliĝon senditan en Budapeŝton. Do, ĉio estis jam en ordo. Mi povis pretigi min al la vespermanĝo kaj al la sekvonta interkona vespero, amuziĝo.

Post kelkaj tagoj ni aŭdis, ke en la najbareco funkciaanta entrepreno produktanta kaj bredante eskuletojn por Okcident - eŭropanoj suferis grandan malprofiton, ĉar kelkaj bredbestoj sukcesis rifuĝi.

Tiamaniere mi eksciis, ke mia ranreĝido devenis de tie.

Aŭdinte tion mi gaje rememoris pri la amuziga hungara popolkanto:

„Eskulanto surgrimpis la salikon.

Eĉ sur ties plej superan branĉeton.

Nek tiel, nek aliel estis bon’,

Ĉu alies edzinon amas la hom’.”

EURÓPA ESZPERANTÓ UNIÓ 7. KONGRESSZUSA

Tájékoztatjuk kedves olvasóinkat, hogy ezt a kongresszust most Szlovéniában, Mariborban rendezik meg 2007. július 28 - augusztus 4-ig.

A részvétel feltételeiről és a programokról tájékozódás:

www.esperanto-maribor.si

LA 7-A KONGRESO DE EŬROPA ESPERANTO UNIO

Ni informas niajn karajn legantojn, ke ĉi tiun kongreson nun oni aranĝos en Maribor, en Slovenio inter 28. 07. 2007-04. 08. 2007.

Pri la partoprenkondiĉoj kaj programaro vi povas informiĝi pri la retpaĝo

www.esperanto-maribor.si

NORDHUNGARIA INFORMO

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Király u.25. 2/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Tel.: + 36 70 570 8895

Retpošto / E-Mail: pasztor.laszlo4@chello.hu

Weblap / Retpaço: <http://kiralylajos.extra.hu>

MSN: pasztor.laszlo4@chello.hu